

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Hama-Ronda Vespero (januaro) kun du prelegoj

En la 20-a de jan., de 17:00 ĝis 18:40, ni havis Hama-Rondan Vesperon kun 15 vizitantoj. Tie estis 2 prelegoj, kiuj estis originale faritaj en la lastajara Japana Esperanto-Kongreso, sed ni jokohamanoj povis malmulte aŭskulti pro diversaj farendaj aferoj.

(1) “Kiel lerni Esperanton per lerta telefono (saĝtelefono)”, de belmonto (t.e. s-ro Jamaŝita Toŝihiro) el Kagoŝima. Estas diversaj aplikaĵoj

(programoj) uzeblaj, sed lia hodiaŭa parolo ĉefe temis pri programo nomata “Zoom”, por telekunsido aŭ tele-babilado de multaj personoj. Portantoj de saĝtelefono inter la aŭskultantoj provis mem sperti uzante la programon.

(2) “Miaj memoroj pri Prof. Ivo Lapenna”, de Glauco Pompilio: Vi legas la enhavon en tiu ĉi kaj la venonta numeroj.



s-ro Jamaŝita Toŝihiro

(foto liverita de s-ro Doi Hirokaz)



s-ro Glauco Pompilio

Karaj legantoj ekster Japanio!

Se vi preferas legi tiun ĉi organon “Novaĵoj Tamtamas” per reto anstataŭ papere per poŝto, volu informi nin tiel, retmesaĝe al tamtamo@googlegroups.com. Tio ŝparos al ni poŝtan tarifon.

(Noto: Legantoj, kiuj kune ricevas japanlingvan “La Tamtamo” poŝte, daŭre ricevos tiun ĉi poŝte.)

La 4-a Ĝenerala Kunsido

Nia Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama havis la 4-an Ĝeneralan Kunsidon en la 28a de jan. en la kutima kunvenejo. Ĉeestis 16 personoj, kaj estis 36 mandatoj. En la komenco, Sibayama Zyun'iti dankis la membrojn pro ilia sindona agado por la lastajara okazigo de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso en nia urbo Jokohamo, kaj atentigis, ke en 2018, nia grupo havos la 50-jaran jubileon de la fondo (kiam estis Jokohama Esperanto-Rondo).

Jenaj decidoj estis faritaj en la kunsido.

1. Agad-raporto kaj kasraporto por 2017 (kun aprobo de la Revizoroj)
2. Agad-plano kaj buĝeto por 2018, kun ioma modifo
3. Parta revizio de la Statuto de la organizo
4. Aprobo de la estraranoj kaj revizoroj, nome same kiel en la jaro 2017.

Post la decidoj, oni rigardis videigitan televidan dokumenton pri la Japana Esperanto-Kongreso en 1987 kaj samjaran Zamenhof-Feston de Gubernio Kanagavo.

Sekvis liberaj paroloj pri nia agado.

Kelkaj el la ĉeestintoj poste vizitis "Novjaran Festenon" en ĉina restoracio Fukuyoken.

Jokohama Internacia Forumo

Okaze de tiu Forumo, kie multaj organizoj por internaciaj agadoj en Jokohamo kunvenis en la konstruaĵo de JICA Jokohama, nia grupo havis 90 minutojn da prezentado en la 4-a de feb., sub la temo "Planante ekspozicion pri la mondaj lernolibroj pere de Esperanto". En ĝi, ni prezentis la lernolibrojn kaj donis klarigon. Poste ni prezentis pri Esperanto mem. Estis iom pli ol 10 aŭskultintoj, krom niaj 7 membroj.

Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*feb. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero

Hamalocio (1): Parolos Suzuki Keiichiro pri biero en Jokohamo, Namba Fumiharu pri akvo en Jokohamo, kaj Sibayama Zyun'iti pri Fervojoj kaj Aŭtovojoj en Jokohamo.

*mar. 10-11 [KK] Foiro de Civitana Agado.

Grupoj uzantaj KK-n por sia agado kunvenas kaj ekspozicias pri siaj agadoj.

*mar. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero

Hamalocio (2): Parolos Saguchi Yuko pri lernejoj lunĉoj en Jokohamo, Tanigawa Hiroshi pri distrikto Kotobukicho en Jokohamo, kaj Doi Ĉieko pri Esperanto-Movado en Gubernio Kanagavo, inkluzive de Jokohamo.

Letero el leganto en Ĉilio

Karaj Hama-Rondanoj,

Mi ricevis la n-ro 331 de via gazeto Novaĵoj Tamtamas, presitan sur bela papero, kun informoj kaj fotoj pri la 104-a japana E-kongreso. Gratulon pro la sukcesa okazigo de tiu grava evento!

Per tiu eldono mi jam kompletigis interesan, 12-ekzempleran kolekton de via gazeto (ekde la n-ro 319, de oktobro 2016), danke al kiu mi multon lernis pri via admirinda E-agado. Mi ekz. tre ŝatas la fakton ke ĉe vi okazas regulaj legokunsidoj, kun interesa interŝanĝo de impresoj pri la koncerna verko. Mi ankaŭ ĝuis la interesan mesaĝo-interŝanĝon inter s-roj Tanigawa Hiroshi kaj Ji Yingeng (n-ro 330), inter pluraj aliaj

legaĵoj. Tamen, la bele presita n-ro 327 probable ĉiam restos mia plej ŝatata, pro la lernolibra kolekto de unuopaj etnolingvoj.

Kvankam ja estas agrable kaj instige ricevi la bele afrankitan koverton, mi timas ke estas tro multekoste sendi la gazeton al tiom fora lando, kiom Ĉilio estas rilate al Japanio.

Mi do petas al vi, se tio eblas, nur sendi al mi perrete la PDF-dosieron de ĉiu aperonta n-ro, aŭ almenaŭ anonci al mi la fakton per retmesaĝo, tiel ke mi trovu ĝin ĉe la retejo de via rondo. Mi estas treege danka pro la ĝisnuna sendado, sed mi volas helpi vin ŝpari.

Tre amike,

José Antonio Vergara

Prelego

Miaj memoroj pri Prof. Ivo Lapenna (1)

Glauco Pompilio

Lapenna en UEA

La unua fojo, kiam mi konatiĝis kun Prof. Ivo Lapenna, estis okaze de estrara kunveno en Roterdamo, antaŭ pli ol 50 jaroj.

Mi estis tiam deĵoranta ĉe la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) nur de kelkaj monatoj kiel tute nova – kaj tute juna! – librotenisto.

Fakte en 1955, okaze de la Universala Kongreso en Bologna (Italio), kies membro de la Loka Kongresa Komitato mi estis, mi renkontis lin kaj verŝajne mi eĉ parolis kun li, sed, kiel dirite, la unua vere persona kontakto inter ni okazis kelkajn jarojn poste en Roterdamo.

Tiutempe Prof. Lapenna estis la Ĝenerala Sekretario de UEA kaj en tiu funkcio li havis ankaŭ la taskon plani kaj organizi la Estraran Kunvenon, pripensi kaj proponi ĝian tagordon.

Teorie estis tasko de la Prezidanto gvidi la estrarajn kunvenojn, laŭ la tagordo proponita de la Ĝenerala Sekretario kaj antaŭe akceptita de la Estraro.

Praktike dum la kunvenoj – certe dum la estraraj kunvenoj en la periodo de mia kunlaboro en la Centra Oficejo de UEA unue kiel librotenisto kaj poste kiel Konstanta Kongresa Sekretario – oni povis konstati ke, jes!, la Prezidanto malfermis kaj fermis ilin, donis aŭ haltigis la parolrajtojn al tiu aŭ al alia kunvenanta estrarano, malfermis kaj fermis la diskutojn pri la tagordaj temoj ktp, sed klare ĉiuj movoj de la Prezidanto – kompreneble ne liaj decidoj – sekvis precizajn indikojn de Prof. Lapenna.

Tion kelkaj, certe malmultaj, estraranoj ne ŝatis, sed la plejmulto el ili konsciis, inteligente, pri siaj kapablecaj limoj kaj konsciis ke, kvankam ili estis validaj en sia ĉiutaga profesio, mankis al ili tiu “io” necesa por organizi, kunordigi, konkretigi kaj, kial ne?, ankaŭ refuti tiujn multajn planojn fantaziajn, kiujn la Estraro kaj la membraro de UEA alportadis.

Mallonge, ili bone konsciis ke mankas al ili la necesa, gvida kaj organiza kapablecoj, ĉar

organiza kapableco ne estas io, kion oni povas akiri pere de studado – kvankam studado kaj praktikado certe ĝin ampleksigas.

Kaj Prof. Lapenna tiajn kapablecojn plene havis!

Bona organizanto havas ordemajn sentojn aŭ almenaŭ ordemajn regulojn, konservas siajn dokumentojn en la ĝustaj kaj ĉiam en la samaj lokoj, por povi ilin tuj rapide trovi kiam necesas, devas fiksi laborplanon kaj ĝin sekvi.

Tiuj ĉi kaj kelkaj aliaj estas kvalitoj, kiujn bona organizanto devas havi aŭ devus ĉiukaze pliampleksigi pere de studado kaj praktikado.

Sed, kvankam certe gravaj, ili ne estas fundamentaj kaj ili ne estas ĉiukaze la solaj.

Ĉar organiza kapableco signifas ankaŭ – kaj ĉefe – bone scii kion oni volas atingi kaj ĉiam havi antaŭ siaj okuloj tiun celon.

Organiza kapableco estas antaŭvidi ĉiujn kaj ĉiajn malfacilaĵojn, kiuj povus bari la vojon aŭ malfaciligigi la vojon al la celo, kaj antaŭpretigi sin per taŭgaj rimedoj por nuligi aŭ ĉirkaŭiri ĉiujn malfacilaĵojn.

Organiza kapableco estas vidi en kaj trans la okulojn de la kunlaborantoj, kompreni iliajn sentojn kaj iliajn kvalitojn por ilin eligi kaj direkti al praktika uzo por plenumo de la propra tasko, tio estas por plenumo de la celo.

Organiza kapableco estas motivigi siajn kunlaborantojn pere de taŭgaj vortoj kaj, nepre, pere de propra agado kiel ekzemplo.

Kaj tiuj kaj aliaj similaj organizaj kapablecoj estis evidentaj ĉe Prof. Lapenna.

Des pli evidentaj ili fariĝis aŭ, mi diru, la manko ĉe aliaj estraranoj plievidentigis ilin kiam Prof. Lapenna estis elektita kiel Prezidanto de UEA kaj la funkcio de Ĝenerala Sekretario transiris sur la ŝultrojn de alia estrarano.

Tiuj praktikaj konsiloj kaj gvidadoj, kiuj antaŭe estis irantaj de la Ĝenerala Sekretario al la Prezidanto, tiam ŝanĝis direkton de la Prezidanto al la Ĝenerala Sekretario.



Mi esperas ke oni ne miskomprenu tion, kion mi volas diri.

Ne temas ĉi tie pri altrudo de propra opinio fare de Prof. Lapenna al la aliaj estraranoj kaj aparte al la Ĝenerala Sekretario, kiu cetere, mi bone memoras, estis tiam bonvola, fidela kaj valora kunlaboranto.

Tre malproksime de mi estas la intenco ĉi tie diri ke la aliaj estraranoj valoris nenion. Absolute ne!

Ĉiuj tiamaj estraranoj povis doni, kaj certe donis, grandan kontribuon al la laboroj de la Estraro de UEA.

Sed estis Prof. Lapenna, ĉu kiel Ĝenerala Sekretario ĉu kiel Prezidanto, kiu havis la ĝustajn organizajn kvalitojn por motivigi la membrojn de la Estraro kaj por valorigi kaj utiligi en la ĝustan direkton la kvalitojn de ĉiu el ili.

Do, kial ne akcepti la faktojn kaj akcepti ke Prof. Lapenna montru, kiel Prezidanto, tiun saman organizan kapablecon, kiun li montris tiel efike kiel Ĝenerala Sekretario?

Prof. Ivo Lapenna estis kaj estas konata kaj rekonata kiel arda kaj eminenta Esperantoganto, kies meritoj por la Movado estas netrotakseblaj. Li estis rekonata en la mondo sciencisto-pioniro, kaj esploranto en difinita fako de internacia juro.

En Esperanto-Movado li estis konata kiel granda inventisto rilate organizajn aferojn. Iniciatinto kaj realiginto de pluraj organizaj konceptoj. Ĝenerale dirite persono, kiu puŝis antaŭen la Esperanto-Movadon en ĉiuj sferoj de ĝia aktivado.

Danke al tio kreskis la prestiĝo de la Movado internaciskale, kio trovis sian kulminon en la fama rezolucio de Montevideo en Decembro 1954, en kiu UNESCO rekonis kulturen valoron de Esperanto kaj ĝian pozitivan rolon por internacia kunlaboro de popoloj.

Tiuj kiuj havis eblecon aŭdi Ivo Lapenna unuanime atestas ke liaj paroladoj kaj prelegoj estis vera artaĵo. Li ankaŭ distingiĝis per kapablo bele paroli en senperaj kontaktoj, rektaj konversacioj. Strebante la altigon de la Movado li multe vojaĝis kaj aŭdigis centojn da prelegoj.

Dum preskaŭ 60 jaroj de sia Esperanto-aktivado Ivo Lapenna efektivigis neimageble inventeman laboron, kies celo estis ke la mondo

rekonu Esperanton kiel kulturen fenomenon, lingvon per kiu la homoj povas plene esprimiĝi.

La vivo de Lapenna (1)

Ni momenton rigardu la neesperantistan vivon de Ivo Lapenna.

Li naskiĝis en Split, en la tiama Dalmatio, en la jaro 1909. La patro, Petar, estis akademia konstruĝeniero kaj universitata profesoro kaj la patrino, Amelia, estis pianistino. En Split li vizitis lernejon ĝis la klasika gimnazio. Poste li studis juron en la Universitato de Zagrebo kaj tie li doktoriĝis en 1933.

En la sama jaro li finis la okjaran mezgradan lernejon de la Muzika Akademio en Zagrebo (pri violonĉelo) kaj diplomiĝis kiel mezgrada instruisto de muziko.

Post la deviga soldatservo en la Akademio por Rezervaj Oficiroj en Tuzla (Bosnio), el kiu li fariĝis rezerva leŭtenanto, li praktikis kiel juĝista-advokata kandidato en la kortumoj kaj en advokataj oficejoj.

En Aprilo 1941 la naziaj trupoj kune kun la ustaŝaj trupoj (tio estas la jugoslavaj faŝistoj) okupis Zagrebon. Ivo Lapenna, kiu, pro siaj demokratiaj kaj progresemaj ideoj kaj aktivadoj, inkluzive la laboron por Esperanto, troviĝis sur la listo de arestotoj kaj deportotoj, tuj "subteriĝis", t.e. igis sin netrovebla kaj fine de 1941 per falsa pasporto sukcesis fuĝi al Split, tiutempe sub itala okupado.

En 1943 li aliĝis al la Naciliberiga Armeo kaj komence de 1944 li estis sendita en Bari (Italio), tiutempe ne plu sub la regado de la faŝista registaro dank' al la aliancana armeo. Tie li fariĝis redaktoro de la ĵurnalo "Tagnovaĵoj" de la Jugoslavia Milita Misio kaj, iom poste, de "Heroldo de Unuiĝintaj Nacioj", kiun la aliancana aviadilaro ĵetadis en 10 milionoj da ekzempleroj sur la okupitan teritorion en Jugoslavio tri fojojn semajne. *(daŭrigota)*

(noto de la redaktoro)

Tiun ĉi prelegon faris s-ro G. Pompilio 2-foje. 1afoje en la 104-a Japana Kongreso, novembron 2017, kaj 2afoje en la Hama-Ronda Vespero, januaron 2018, ambaŭfoje en Jokohamo.